

Eŭropa Bulteno

Januaro 2020, Numero 199

EŬROPA KOMISIONO MALFERMOS VASTAN DISKUTADON PRI LA ESTONTO DE EU



En la unua duono de ĉi tiu jaro Kroatio prezidas la Konsilion de EU (tria plej grava organo de EU post la Eŭropa Parlamento kaj Eŭropa Komisiono) Kaj en tiu periodo ĝi gvidos centojn de kunsidoj de eŭropaj institucioj inter kiuj ankaŭ regulajn kunsidojn de ĉiuj landaj ministroj. Eŭropa Komisionano (nomumita de Kroatio), unu el kelkaj vicprezidantoj de EK, Dubravka Ŝuica estis taskigita starti Eŭropan konferencon pri Estonteco de EU. Tiu konferenco daŭros dum du jaroj komencante la 9-an de majo ĉi-jare, okaze de la Tago de Eŭropo. Jen kio estas notita en la dokumento pri tiu konferenco:

„La temoj de la Forumo ampleksas batalon kontraŭ klimatsanĝoj kaj alfronton de ekologiaj defioj, ekonomion en intereso de la civitanoj, socian justecon kaj egalecon, digitalan transformon de Eŭropo, antaŭenigon de eŭropaj valoroj, fortigon de ĉeesto de EU en la mondo same kiel fortigon de demokratiaj fundamentoj de EU.

La Eŭropa Komisiono konsideras la Konferencon pri Eŭropa estonteco kiel forumon bazitan je kontribuoj de la loĝantaro, kiu ne estos alirebla nur de civitanoj el la ĉefurboj de la Unio, sed ankaŭ de loĝantaro el ĉiuj ĝiaj partoj. Aliaj institucioj de EU, naciaj parlamentoj, sociaj partneroj, regionaj kaj lokaj organoj de la civila socio estas invitataj aliĝi. Helpe de plurlingvaj interretaj platformoj oni certigos la travideblecon de la diskutoj kaj subtenos pli vastan kunlaboron. La Eŭropa Komisiono kunlabore kun aliaj institucioj de EU devigis sin trovi pli bonan manieron por la ideojn de la civitanoj kaj respondinformojn ricevitaj ĝi transformu al konkretaj politikoj de EU.“

Esperantistoj havos grandan ŝancon partopreni en la vastaj diskutoj kiuj malfermiĝos en la retejoj en pluraj lingvoj por proponi siajn viziojn pri la Estonto de Eŭropo. EEU-estraro jam komencis diskuton pri tio.

Zlatko Tišljarić

100 JAROJ DE LITOVA ESPERANTO-ASOCIO



Rimarko de la redaktoro:

En la pasinta numero de EB aperis samtitola artikolo, sed temis nur pri unuaj 20 jaroj de la litova movado kaj nun ni aperigas alian artikolon kiu prilaboras la tutan 100-jaran historion de tiu ĉi tre aktiva landa E-movado.

Esperanto en Litovio ekĝermis tuj post 1887, kiam aperis la unua lernolibro de Esperanto en Varsovio. La unua litova esperantisto estis tre fama personeco de tiutempa Litovio – prelato, verkisto, literaturisto, poeto, publicisto, eĉ matematikisto, aktiva socia aganto Aleksandras DAMBRAUSKAS. En la unua Zamenhofa Adresaro li estis 186-a. Jam en 1890 li verkis kaj eldonis la unuan lernolibron de Esperanto por litovoj. Baldaŭ aperis la unuaj Esperanto-societoj. Post la unua mondmilito en la jaro 1918 litovoj rekredis sendependan ŝtaton kaj jam en 1919 estis fondita Litova Esperanto-Asocio, kies fondinto kaj multjara gvidanto estis la sama prof. Aleksandras DAMBRAUSKAS. En 1922 aperis monata Esperanto-revuo „Litova stelo“, ĝin ekredaktis denove Aleksandras DAMBRAUSKAS. En diversaj urboj de Litovio aperis multaj esperantistaj kluboj, societoj, la esperantista vivo estis tre vigla.



Tamen en la jaro 1940 Litovio estis okupaciita kaj aneksita, ĝi fariĝis parto de Sovetunio, kie Esperanto-movado estis malpermesita kaj persekutata. La movado kolapsis. Litova Esperanto-Asocio estis perforte likvidita. Nur en la jaro 1956 la vorto Esperanto en Sovetunio ĉesis esti tabua. Kaj poiomete komencis reapari malnovaj esperantistoj, en grandaj urboj kiel Vilnius, Kaunas, Klaipėda, Šiauliai, Panevėžys fondighis esperantistaj kluboj.



Ekaktivis malnovaj esperantistoj Antanas POŠKA, Juozas PETRULIS, Adomas VAITILAVIČIUS, Albinas VEBELIŪNAS kaj multaj aliaj. Oni sukcesis en 1959 eldoni novan lernolibron de Esperanto, litovan-esperantan vortareton. Tamen organizita Esperanto-movado ankoraŭ ne povis ekzisti, asocioj ne rajtis organiziĝi. Esperantistoj estis eltrovemaj kaj en 1959 en Latvio estis organizita la unua Baltia esperantista tendaro (BET), kiu fariĝis ia konstanta

organiza formo ne nur de esperantistoj el tri Baltiaj respublikoj (Estonio, Latvio, Litovio) ĉiujare organizataj laŭvice en tiuj tri respublikoj, sed baldaŭ fariĝis tre amasa tutsoveta esperantista aranĝo. Ĉar tiutempe ne eblis viziti Universalajn Kongresojn de Esperanto, BET fariĝis alternativo de UK, iaspeca minikongreso de Esperanto.

Nova periodo de esperantista movado en Litovio komenciĝis en 1988, kiam sekve de gravaj politikaj ŝanĝoj en tuta Sovetio litovaj esperantistoj decidis restarigi dum 1919-1940 funkciintan Litovan Esperanto-Asocion. Ĝi tuj aliĝis al UEA. En 1990, kiam Litovio denove fariĝis sendependa ŝtato, en Litovio ekaperis novaj pli vastaj horizontoj. Asocio en Kaunas ricevis de la registaro historian Zamenhof-domon, en 1991 estis renovigita eldonado de prestiĝa dumonata Esperanto-revuo „Litova stelo“, ku aperadis ĝis 2010.

Dum tri jardekoj post restarigo Litova Esperanto-Asocio fariĝis unu el la plej aktivaj kaj rezultodonaj sociaj organizaĵoj en Litovio. Ĝiaj ĉefaj atingoj en tiu periodo estas jenaj:

1. Aliĝo al UEA kiel aliĝinta nacia landa asocio en 1989, kiam Litovio ankoraŭ ne estis sendependa ŝtato.
2. En 1991 restarigo de dumonata Esperanto-revuo „Litova stelo“, kiu estis disvastigata en pli ol 50 landoj kaj aperadis ĝis 2010 inkluzive.
3. Litova Esperanto-Asocio transprenis organizadon de Baltiaj Esperanto-Tagoj, organizataj ekde 1959 laŭvice en Estonio, Latvio, Litovio. En Litoviaj BET-oj nun kutime partoprenas pli ol 300 esperantistoj el pli ol 30 landoj. Ĝis nun en Litovio okazis 18 tiaspecaj aranĝoj.
4. En 1991 Litova Esperanto-Asocio de Litovia Registaro ricevis por senpaga uzo domon en Kaunas, str. L.ZAMENHOF 5, kiu siatempe apartenis al bopatro de Ludoviko ZAMENHOF Aleksandro ZILBERNIK. En tiu domo estas kreita Litovia esperantista centro, kie estas sidejo de Litova Esperanto-Asocio, biblioteko de Esperanto-literaturo enhavanta pli ol 10000 titolojn, arkivo de litova esperantista movado, instrua centro de Esperanto, eldona centro, redakcio de la revuo, turisma agentejo, gastejoj. Estas kreata muzeo de L.ZAMENHOF kaj de litova Esperanto-movado.
5. En 1998 laŭ zorgo de Litova Esperanto-Asocio en Veisiejai, urbeto, kie iam loĝis Ludoviko ZAMENHOF, estis starigita impona monumento por la aŭtoro de Esperanto. Laŭ multaj atestoj ĝi estas la plej bona monumento al Ludoviko ZAMENHOF en la tuta mondo. En 2005 en Vilnius, ĉefurbo de Litovio, unu strato estas nomumita strato de Ludoviko ZAMENHOF. En Litovio estas ankoraŭ kelkaj ZEOJ.
6. En 1999 en Vilnius estas fondita filio de Litova Esperanto-Asocio.

7. En 1996-2008 laŭ invito de Litova Esperanto-Asocio en Litovio gastis prezidantoj de UEA prof. Lee CHONG-YEONG (Koreio) kaj prof. Renato CORSETTI (Italio), ĝenerala direktoro de UEA Osmo BULLER (Finnlando), kiuj krom multaj aliaj oficialuloj de Litovio estis akceptitaj fare de tiutempaj prezidentoj de Litovio Algirdas BRAZAUSKAS, Valdas ADAMKUS, tiutempaj prezidantoj de Litovia parlamento Česlovas JURŠĖNAS, Artūras PAULAUSKAS, tiutempaj ministroj pri eksterlandaj aferoj, de kulturo, de edukado kaj scienco.
8. Per sia aktiva konsekvenca kaj rezultodona agado Litova Esperanto-Asocio atingis, ke en 2005 en la ĉefurbo de Litovio Vilnius estu organizita la 90-a jubilea Universala Kongreso de Esperanto. Tiu-ĉi kongreso ĝis nun estas la plej granda internacia aranĝo en Litovio (2344 personoj el 63 landoj)
9. En 2008 Litova Esperanto-Asocio organizis tre sukcesan la unuan tutmondan kongreson de esperantistoj-ĵurnalistoj, kiun partoprenis pli ol 250 personoj el 40 landoj.
10. Dum tiuj tri jardekoj Litova Esperanto-Asocio organizis multajn aliajn gravajn internaciajn esperantistajn aranĝojn, ekz. la 65-an kongreson de SAT, la 8-an internacian medicinan Esperanto-konferencon, la 11-an ekumenan esperantistan kongreson, la 57-an internacian katolikan kongreson, la 38-an konferencon de ILEI kaj multajn aliajn.
11. En 2005 Litova Esperanto-Asocio en palaco de Litovia parlamento en Vilnius organizis tre gravan 4-an internacian NITOBESIMPOZION laŭ la temo „Lingvo-plitikaj aspektoj de pliampleksigo de Eŭropa Unio“, en kiu partoprenis pli ol 100 politikistoj, lingvistoj, sociaj agantoj el pli ol 30 landoj.
12. Litova Esperanto-Asocio tre aktive laboras en eldona kampo. Laŭ ĝia kunordigado kaj gvidado en diversaj prestiĝaj litovaj eldonejoj dum 2000-2010 estis eldonitaj pli ol 100 fundamentaj libroj en litova lingvo kaj en Esperanto pri instruado, historio de Esperanto, interlingvistiko kaj esperantologio, problemoj de internacia lingvo, tradukoj de belarta literaturo, libroj pri Litovio k.s. En 2018 okaze de proksimiĝanta 100-jariĝo de Litova Esperanto-Asocio aperis kapitala, tre ampleksa libro „La granda litova-Esperanta vortaro“ (816 paĝoj).
13. Litova Esperanto-Asocio ankaŭ intense laboras en kampo de instruado de Esperanto. En diversaj kursoj dum lastaj jardekoj Esperanto estis instruata al pli ol 5000 personoj, estis invititaj Esperanto-instruistoj el Australio, Brazilo, Bulgario, Slovakio, Pollando.
14. Litova Esperanto-Asocio pro sistema agado ricevis vastan internacian rekonon. En 1995 ĝi ricevis internacian premion „Cigno“, en 1997 ĝi estis premiita per premio Grabovski. En 2003 Litova Esperanto-Asocio estis agnoskita kiel la plej bone funkcia nacia Esperanto-Asocio en kadre de UEA kaj ricevis Trofeon Fyne.
15. Litova Esperanto-Asocio multe laboras en kleriga kaj eduka tereno informante socion pri problemoj de internacia lingvo, pri esenco de esperantista movado k.s. Estas organizataj ekspozicioj, prelegoj, artikoloj kaj intervjuoj en la gazetaro, radioj kaj televido.
16. Gvidantoj de Litova Esperanto-Asocio (Povilas JEGOROVAS, Audrys ANTANAITIS, Vytautas ŠILAS k.a.) estas konstante elektataj en gvidantaron de diversaj internaciaj esperantistaj organizaĵoj. Tri famaj litovaj esperantistoj (Petras ĈELIAUSKAS, Telesforas LUKOŠEVIČIUS, Antanas MEKYS) estas elektitaj Honoraj Membroj de UEA.
17. Litova Esperanto-Asocio konstante vastigas kaj flegas internaciajn esperantistajn kontaktojn kaj rilatojn. Multnombraj grupoj de litovaj esperantistoj ĉiujare partoprenas Universalajn Kongresojn de Esperanto en diversaj landoj kaj en diversaj Eŭropaj kaj aliaj internaciaj esperantistaj aranĝoj.
18. Litova Esperanto-Asocio ĝuas subtenon (ankaŭ ofte financan) de Litovia Registaro, de urbaj municipoj de Vilnius, Kaunas kaj de aliaj urboj.
19. La plej altranga litova esperantisto estas eksmembro de Eŭropa Komisiono Vytenis Povilas ANDRIUKAITIS, kiu en 2016 partoprenis kaj faris ĉefan prelegon en Esperanto

dum la internacia konferenco en slovaka urbo Nitra laŭ temo „Perspektivoj de lingva komunikado en Europa Unio“. Li ankaŭ partoprenis la kongreson de Europa Esperanto-Unio en germana urbo Freiburg en junio 2017 kaj ankaŭ faris ĉefan paroladon en Esperanto okaze de 100-jariĝo de morto de Ludoviko ZAMENHOF. Li estas elektita kiel honora membro de Europa Esperanto-Unio. Kaj dum la 103-a Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono li estis elektita membro de Honora Patrona Komitato de UEA. Li estas la plej altranga politikisto en la mondo nuntempe, kiu mem estas esperantisto kaj ĉiuflanke subtenas nian movadon.



20. Nuntempe en Litovio estas ĉirkaŭ 6000 esperantistoj. Multaj el ili estas membroj de Litova Esperanto-Asocio.

Litova Esperanto-Asocio nuntempe estas unu el la plej solidaj kaj aktivaj sociaj organizaĵoj de Litovio. Ĝi havas grandan landan kaj internacian rekonon. Havante tian renomon ĝi kurtaĝe eniras en la duan jarcenton de sia agado.

Povilas Jegorovas
Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

PREZIDANTO DE EEU INTERPAROLIS KUN ANTAŬA ĜENERALA SEKRETARIO DE EŬROPA KOMISIONO

Mi havis bonan 40-minutan konversacion kun Martin Selmayr pasintsemajne (antaŭa Ĝenerala Sekretario de la Eŭropa Komisiono, nun ĉefo de la oficejo de la Komisiono en Vieno). Ni komencis pri Eŭropa identeco, sed daŭrigis pri ebla rolo por Esperanto, kompreneble. Li montris grandan intereson – eĉ fotografis la libron de Ulrich Lins, “Die Gefährliche Sprache”, por mem mendi ĝin. Li demandis ĉu mi pretas gvidi diskuton pri Esperanto en la Komisiono en Vieno, kaj kompreneble mi konsentis. Li petis min sendi al li la tekston de la Eŭropa Himno en EO, kaj tion mi faris. Li parolas tre bonan anglan, sed ni diskutis germane. Fine, li proponis ke ni uzu “Du” (ci) unu kun la alia.

Seán Ó Riain

FILMETO PRI ESPERANTO SUBTITOLITA EN MULTAJ LINGVOJ

Antaŭ kelkaj monatoj, la franca asocio de Eŭropo Demokratio Esperanto partoprenis la eŭropan baloton, per listo de kandidatoj. Por la televida kampanjo ni faris filmeton (en la franca lingvo) por reklami pri nia komuna celo, uzi Esperanton por faciligi rilatojn inter eŭropaj civitanoj.

Ni forigis la finon, kiu petis voĉdoni por nia listo de kandidatoj, tiel ke tiu filmeto estas uzebla ekster baloto, kaj faris subtekstojn en ĉiuj oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio, kaj ankaŭ en Esperanto.

Tiuj 26 filmetoj estas videblaj en

<https://www.youtube.com/channel/UCYn83HDC-yBkMhPWb1mAlFw/videos>

Ili estas libere uzeblaj.

Pierre Dieumegard

LA MALAVANTAĜOJ DE RETA TEKSTKONSERVADO

Mi havas blogon en retejo ipernity jam de kvin jaroj kaj tie mi aperigas diversajn miajn meditaĵojn, pripensojn kaj reagojn pri la mondo ĝenerale kaj esperantujo. Mi ekŝatis tiun retejon ĉar ĝi havas la eblon ĉion aranĝi en Esperanto kaj informojn en ĝi. Kiel ĉio, ankaŭ tiu retejo estas rezulto de agado de individuoj. En ĝi enestas multaj esperantistoj kaj oni povas elekti nur tiujn kiujn oni konas por esti amikoj de via blogo. Tio plaĉis al mi, ĉar oni ne estas bombardata de miloj aŭ centmiloj da tekstoj ĉiutage. Kaj oni povas skribi ankaŭ pli longajn analizajn tekstojn. Dum la multaj jaroj de mia membreco tie kolektiĝis centoj da miaj artikoloj kaj iel la blogo fariĝis mia arkivejo kaj montrilo al ekstero kaj ankaŭ por mi mem ĉar plejmulto el ili ne estis konservita aliloke. Sed antaŭ du jaroj ekkriziĝis la retejo. La administranto ne plu volis administri senpage kaj estis demando ĉu la retejon en Esperanto oni fermos. La plimulto de membroj konsentis pagi sufiĉan sumon jare por ke la retejo pluekzistu kaj ĝi estis savita. Tiam mi jam pensis kiel savi tiujn miajn tekstojn, se la retejo estos fermita, kio iĝis problema, ĉar temis pri grandega laboro por transmeti la tutan artikolaron al mia propra hejma komputilo.

Kaj pasintjare ekestis teknikaj problemoj: la retejo malebligis al mi eniri ĝin. Mi plendis kaj fine troviĝis iu kiu riparos la eraraon. Tiu stato daŭris kelakajn monatojn kiam la eraro ripetiĝis. Mi nun denove ne plu povas eniri kaj uzi la blogon.

Intertempe mi eksciis ke plimulto de esperantistoj jam eliris el ipernity kaj uzas aliajn retejojn ĉar aperas novaj retejoj, pli modernaj. Iu rekomendis al mi transiri al la retejo NUBO, kreita nur por esperantistoj. Ŝajne ipernity estas perdita por mi kaj ankaŭ mi devos ekuzi iun alian. Mi neniel volas eniri vizaĝlibron aŭ tviteron – ĉar mi ne volas rilati al milionoj da homoj kaj perdi tempon por sekvi sennombrajn bagatelajn babilojn.

Nun mi konstatas ke la retejoj rapide malmoderniĝas aŭ eniras ekonomian krizon. Tio kion mi tie konservis malaperas post kelkaj jaroj. Ne eblas eviti tion. Kaj mi konstatas ke miaj

artikoloj aperintaj en gazetoj, revuoj kaj libroj, restas daŭre, almenaŭ tiom longe kiom la fizikaj paperaj arkivejoj restos.

La sorto de fotoj estas la sama. Oni nun fotas centmilojn da fotoj dum kelkaj jaroj kaj neniu plu povas sekvi tiun arkivon. Iam ni fotos malofte kaj konservis tion en niaj albumoj. Mi havas dudekon da albumoj en kiuj troviĝas ĉio rilata al mia vivo kaj ĉiu povas facile trovi tion kio mi lin/ŝin interesas. El miloj da fotoj konservataj nur en la saĝtelefonoj post unu jaro oni ne plu havas tempon por selekti kaj konservi nur gravajn. Tial post kelkaj jaroj ĉio malaperas, ĉar ne plu estas spaco por konservi kaj oni ne havas tempon trarigardi tiun amasegon por elekti nur konservindaĵojn aŭ la telefono perdiĝis, fuŝiĝis. Sekve, mia konkludo: Klasikaj paperaj dokumentoj restas daŭre la plej longdaŭraj.

Zlatko Tišljarić

FESTA SEMAJNO POR INFANOJ KAJ FAMILIOJ EN KASTELO GRESILJON

La festa deka semajno por familioj en kastelo Gresiljon okazos inter la 17a kaj 27a de aŭgusto 2020 en la Kastelo kun aparte riĉa enhavo. Bonvolu konsulti ilian paĝaron kaj decidi ĝustatempe pri via partopreno. Jen ĉi tie la detalaj informoj:

[10a Festa semajno por infanoj kaj familioj](#)

Berto Schuman

LA 2-A EŬROPA CIVITANA RENKONTO EN KASSEL

de la 17-a ĝis la 20-a septembro 2020 en Kassel, Germanio.
Organizas Europa Union Kassel kaj Pulse of Europe Kassel.

- Eŭropo de civitaninoj kaj civitanoj
- La politikaj evoluoj en Eŭropo nin movas.
- Zorge ni observadas kontraŭeŭropajn tendencojn en granda nombro de la membroŝtatoj de la Eŭropa Unio, kiuj konkretiĝas ankaŭ en la naciaj balotoj.
- Por kontraŭagadi tiujn tendencojn Eŭropo bezonas pliprofundigitan integriĝon kaj solidarecon.
- La homoj devas kolektiĝi por konservi kaj pluevoluigi la unuiĝon de Eŭropo.
- Ĉar unuigita Eŭropo havas futuron nur kiel Eŭropo de gecivitanoj, ni volas provi novajn vojojn de interkomunikado kaj interŝanĝoj de spertoj.
- Eŭropo pli forte ol ĝis nun devas kreski de "sube".
- Homoj renkontiĝas al homoj - tio estas nia ideo de la Eŭropa Civitana Renkonto.

Ni estas konvinkataj:

Se ni EU-gecivitanoj pli bone interkonatiĝas, estiĝas konfido kaj solidareco. Pro tio ni volas interrenkontiĝi, interŝanĝi ideojn kaj komune festi en Kassel. Partoprenontoj el foraj lokoj

povas loĝi en gastigaj familioj. Eblas subvencioj por eksterlandanoj.

Kunlaboru:

Se vi volas partopreni la planitajn inform- kaj laboratelierojn, subtenu nin kiel interpretistoj, kunlaboru alimaniere. Se vi deziras pliajn informojn, vi volonte povas kontakti nin.

Kontakto/Sekretariejo:

EBB2020 - Europäische Bürgerbegegnung

Christopher Overkamp, Treppenstrasse 5, 34117 Kassel, Germanio

Retpoŝto: office@kassel-ebb.eu

Aliĝo:

Bv. uzu la formularon en la retejo, kie troviĝas pli detalaj informoj en la germana kaj angla. Sub la kapvortoj "Mitmachen" kaj "Flyer" elŝuteblas manfolio kun superrigardo pri la programo kaj la planitaj atelieroj (inter kiuj unu pri "Esperanto kaj Eŭropo"): www.kassel-ebb.eu

Wolfgang Günther

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de januaro 2020

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Povilas Jegorovas, Seán Ó Riain, Pierre Dieumegard, Bert Schuman, Wolfgang Günther

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

